



Turlanda Esperanta Kulturcentro
 Doma de Asocioj
 Gaston Pailhou Placo
 37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

Enhavtabelo	Paĝoj
En nia libra rubriko, ni prezentas al vi la duan romanon de Céline Laurens, Sub fajenca ĉielo.	1 kaj 2
Kio okazus, se la incendioj de la suda Francio havus lokon en nordo kaj oriento, kie la militoj inter Germanio kaj Francio lasis sub la grundo milionojn da obusoj ?	2 3 kaj 4
La amo, kiu ligas patrinon kaj ŝian filinon ofte estas eksterordinara, sed estas esceptoj. Tiu novelo aperinta en la retejo short-edition.com kaj tradukita de Jean-Mary rakontas escepton.	5 6 kaj 7
Du amuzaj rakontoj	7
Recepto de kukurbeta kuko	8

Rela Kulturo <Libro>

Romano, Sub fajenca ĉielo... la linio 6

Aperigite en la librovendejoj la 5an de januaro 2023, Sub fajenca ĉielo, la nova romano de Céline Laurens, rakontas amaferon naskiĝintan en la metroo. Ĝi ankaŭ ofertas sonĝan enprofundiĝon en la ĉiutagaĵon de la linio 6.

Jacques, la rakontanto, estas metrokondukisto. Li profesias sur la linio 6, inter Charles de Gaulle – Etoile kaj Nation, pasante tra Trocadéro, Montparnasse – Bienvenüe kaj Place d'Italie. Sed ne tie li renkontis la virinon de sia vivo, la belan Madeleine, hipokondrian kaj kaprican. En la stacio Madeleine li enamiĝas, dum li ankoraŭ ne kondukas kaj laboras ĉe la ĝiceto - « tio ŝajnas preskaŭ nekredebla. Tamen tio estas la pura vero. »

Jacques aliĝis al la RATP unue pro pasio : « Mi laboris kiel kondukisto, ĉar mi ŝatis tion, ĉar tio estis profunde ankrita en mi de mia infanaĝo. Cetere mia patro estis laŭ la diroj de mia patrino trajnokondukisto. De kiam mi estis knabo, mi ŝategis la elektraĵajn trajnojn. Min fascinis tio, la bruo de la radoj, de la lokomotivo, la imbriko de la reloj, la nomo de la stacidomoj. Poste mi malkovris Parizon kaj ties metroon. Mi malkovris Guimard kaj lian metalan universon de metalurgia botanikisto, liajn staciojn, kiuj surface aperas kiel nimfeoj sur la bulvaroj. La metroo estis pli ene de

miaj kapabloj... »

Lia amhistorio do naskiĝis en la pariza metroo kaj la transportreto ankaŭ estas la spaco, kie li renkontas virojn kaj virinojn tre malsimilajn. La vivo de Jacques ĉefe okazas laŭlonge de reloj. Lia kolego, Henri, poeto, kiu kondukas metroojn sen entuziasmo, sed kiu vidas la mondon kolora, akompanas lin en lia ĉiutagaĵo.

La linio 6 estas scenejo, kie ĉiutage ludiĝas iom freneza teatraĵo, kies roluloj bravas nur buŝe. Ekzemple en la vagonaroj pasas pasiaj kaj konkurencaj predikantoj, Soren kaj Melchior, kiuj alportas al la uzantoj la dian parolon dum la tempo de voĵiro. Interne de la stacioj nova rabmurdejo vivas sian propran realecon, marĝene de la socio. La bando de Hervé, la ĉielaj trampoĵoj, kiuj frekventadas la kajojn de la stacio Raspail, rekomencas senfinan debaton, dum la grandega René-Charles, kiu drinkis tro da Guinness biero, kantas la kanzonojn de Céline Dion en la vagonoj. Koncerne Amandine, junan marĝenulinon, toksigeman, nesocieman kaj kortuŝan, ŝi provas pluvivi en la urba internaĵo... kun la subteno de Jacques, kiu iafoje permesas al ŝi dormi en lia kondukistejo, kiam la metroo fermas siajn pordojn.

Premio Roger Nimier 2022 por *Tie kie la karavano pasas*, Céline Laurens publikigis *Sub fajenca ĉielo*, sian duan romanon la 5an de januaro 2023. La aŭtorino faras la metroon magia loko. La barokaj digresioj, multaj, malkuraĝigos iujn legantojn – la multobligo de la anekdotoj povas embarasi – kaj la spertuloj de la metroo malfacile rekonos la transportrimedon, kie ili havas siajn kutimojn... Sed la personoj, difektitaj de la vivo kaj marĝenuligitaj, estas kortuŝaj kaj pravigas la legadon de tiu historio en subgrundo.

Sous un ciel de faïence de Céline Laurens.
Albin Michel. (2023) Prezo : 20,90 eŭroj.

Tiun recenzon de Samuel Delziani aperintan en la revuo *la vie du rail* de la 24a de marto 2023 esperantigis Jean-Mary.

Medio

La obusoj de la Unua Mondmilito en oranĝa vigla atento

La risko de unuarangaj incendioj en la arbaro de Verdun estas des pli serioze rigardita, ke milionoj da obusoj enfositaj sub la malnova batalkampo minacas eksplodi.

« *Se morgaŭ estos incendio en la ŝtatbiena arbaro de Verdun, kion ni faros ? Kio okazos kun la milionoj da obusoj ankoraŭ estantaj sub la tero ? Necesos evakui la loĝantaron.* » Samuel Hazard, urbestro de Verdun kaj prezidanto de la urbarokomunumo de la Granda Verdun (CAGV), ne kaŝas sian maltrankvilon.



Sidanta malantaŭ sia skribotablo de la urbodomo, malnova privata hotelo en la stilo de Ludoviko la 13a, la socialista elektito tiras la alarmsonorilon, ĉar la risko estas reala sur tiu malnova bataalkampo de 12000 hektaroj transformita en arbaron.

Verdun estis la kampo de la plej violentaj alfrontoj de la Unua Mondmilito. En 1916, dum 300 tagoj kaj 300 noktoj, inter 50 kaj 60 milionoj da obusoj estis pafitaj sur tiu frontlinio. « *Kaj 20% ne estus eksplodintaj kaj ankoraŭ estus en la tero* », opinias Samuel Hazard. Pli ol unu jarcenton post la konfliktfino, ĉenreakcioj, en kazo de trovarmiĝo, restas neantaŭvideblaj.

Toksaj produktoj kaj « gaso mustardo» (iperito)


La maltrankvilo estas des pli forta, ke la obusoj entenas grandan diversecon de pezaj metaloj kaj toksaj agantoj. Fragmentiĝo-obuso ekzemple povis enteni ĝis 3 kg da plumbo kaj kupron, zinkon aŭ nitrogenajn kunmetaĵojn. La arseniko kaj la perklorato de amonio estis uzitaj kiel eksplodiloj. En la kemiaj obusoj, oni trovas kloron, fosgenon aŭ iperiton ankaŭ nomitan « mustarda gaso », mortigajn en la kazo de inhalo, kaj komponantojn arsenajn ternigajn provokantajn ternojn, larmojn kaj naŭzojn. En la okazo de eksplodo, la ventoj povus puŝi la toksajn emanajn supre de la urbaro de Verdun, situanta en rondvalo, malsupre de la arbaro. « *Ĝis 50000 personoj povas esti frapitaj, opinias Samuel Hazard. Necesas prepari la loĝantaron, fari ekercadojn de evakuado aŭ de izoliĝo por eviti ĝeneralan panikon en la kazo de incendio* ».

La elektito kaj eksprofesoro pri historio kaj geografio ekkonsciis pri la problemo lastan someron, kiam li vidis la francajn arbarojn flamiĝi en Vogejoj kaj en Ĵuraso. Li scias, ke la vasta memora arbaro videbla ekde lia oficejo ne estas ŝirmita. La minaco estas des pli forta tiun jaron, ke la departemento Mozo, kovrita je 37% per arbaroj,



Bruna ŝelskarabo, difekteganto de piceaj arbaroj

estis la unua franca departemento metita la 12an kaj la 13an de junio en « oranĝa vigla atento pro arbarfajroj », eĉ antaŭ la departementoj Gardo kaj Varo. La departemento rekte trasuferas la klimatan ŝanĝiĝon. Ekde 2018, la krizo de la ŝelskarabo difektegis 800 hektarojn da piceoj en la arbaro de Verdun. Tirante profiton el arboj malfortigitaj de la hidra stresoj, tiuj insektoj ronĝis trunkojn de miloj el ili. Alvenante al la ostarejo de Douaumont, kie ripozas la restaĵoj de 130 000 nekonataj soldatoj fronte forfalintaj, la damaĝoj vidiĝas je la unua ekrigardo. Parceloj estas nudaj. « *La kombinado de la krizo de la ŝelskarabo, de la someraj varmegoj kaj de la grava frekvento de tiu memoriga loko konserinde kreskigas la riskon de ekfajroj* », detale



raportas Jonas Verain, direktoro de la teritoria agentejo de la Oficejo Nacia de la Forestoj (ONF) de Verdun.

Sur senarbitigitaj zonoj, la ONF plantis speciojn devenajn el la mediteranea ĉirkaŭo por anticipi la modifon de la klimataj kondiĉoj antaŭ la jarcenta fino. Tiu arbara revolucio strebas anstataŭigi la piceojn, kiuj nepre malaperos, per tigfoliaj kverkoj, cedroj el Atlaso aŭ per pinastroj ekzemple. La arbaristoj ankaŭ plantas fagon, aceron, sorpon aŭ merizarbon. « *La foliarboj meze de grupoj de rezinarboj kreskigas la reziston de la arbaro fronte al la parazitaj atakoj kaj kreas naturajn fajroŝirmilojn* » klarigas Jonas Verain. La ONF estas en unua linio antaŭ la klimata ŝanĝo kaj konas la danĝerojn ligitajn al la obusoj. Inter la riskoj, la fajreroj produktitaj per la arbaraj maŝinoj, kiuj povas flamiĝi la sekan vegetalaron. « *Tiujn lastajn jarojn, ni havis plurajn mekanikajn malagrablaĵojn, el kiuj unu eksplodon en la malantaŭaĵo de traktoro* » konfirmas Yannick Baravent, arbaristo ĉe la ONF kaj sindikata elektito Snupfen-Solidaires (Solidaraj). La direktoro de la ONF devis lastan jaron interrompi la arbarajn laborojn kvinfoje por limigi la riskon. La maŝinoj povas ankaŭ elterigi



Sur tiu frontlinio, inter 50 kaj 60 milionoj da obusoj estis pafitaj dum la granda milito

obusojn, el kiuj kelkaj kun fosforo, flamiĝas en kontakte kun la aero.

Neadaptitaj rimedoj

Ekde 1998, la ONF elfosis averaĝe 736 obusojn ĉiun jaron, 232 tunojn entute. En julio 2020, kiam la ONF agentoj laboris en la arbaro, incendio komenciĝis sur parcelo trafita de la ŝelskarabo en Vachevaurille, je 8 kilometroj oriente de la ostarejo de Douaumont. La fajro, kiu bruligis arbarhektaron, nudigis plurajn obusojn. La fajrobrigadistoj devis establi sekuran areon kaj « *atendi la fajron pli malproksime* », klarigas la kapitano Julien Habart, estro de la departementa operaca centro de incendio kaj de moza helpo, ĉeestanta tiun tagon.

« *Se oni alvenas sur zono, kie okazas sinsekvaj eksplodoj, oni ne intervenigas la piedan personaron*, konfesas la kolonelo Stéphane Eslinger, departementa direktoro adjunkta kaj adjunkta korpusestro de la departementa servo de incendio kaj de helpo (SDIS) de Mozo (departemento). *Ĝenerale, koncerne la lukton kontraŭ la arbarfajroj, okazas, ke oni lasas bruli centojn da kvadrataj metroj aŭ hektarojn da arbaro prefere al riski havi homajn perdojn inter ni* ». Por faciligi la intervenon de la SDIS en la arbaro de Verdun, la departementa Direkcio de la teritorioj kartografias la ŝoseojn kaj la arbarajn padojn, la areojn de returniĝo aŭ ankoraŭ la akvejojn ĉe ĉiuj mozaj arbaroj. « *La sudaj departementoj jam faris tion, de antaŭ 30 jaroj,*

eksplikas Xavier Delarue, prefekto de Mozo. *Estas konsiderinda laboro, kiun ni komencas nur ĉe la nordoriento kaj, kiu prenos tempon, ĉar necesas inventi specifajn solvojn. Necesos malfermi tiun arbaron kaj streki novajn padojn intervenigante senminigistojn.* » Okaze de incendio, la interveno de aeraj rimedoj devus esti privilegiita. Ideo, nun ekskizo, estus poziciigi akvofaligajn helikopterojn ĉe la aerodromo de Epinal-Mirecourt, en Vogezoj por administri la incendiojn en la sektoro. « *Sed estas kompleksega havi je ŝtatnivele doktrinon pri uzo de tiuj aeraj rimedoj* », aludvorte konfesas Xavier Delarue. « *Oni jam scias, ke la sudaj departementoj devos alfronti pli kaj pli da incendioj. Sur kiuj rimedoj Mozo povos tiam enkalkuli ?* » sin demandas Samuel Hazard. La elektito lanĉis alarmon, ekde la lasta somero, en letero sendita al la respublika Prezidento. « *La estado de tiu risko (kemia) pezigas sur la tuton de la loĝantaro gravan danĝeron, fronte al kiu niaj helpaj rimedoj montriĝas certe ne adaptitaj kaj nesufiĉaj* », skribis la magistratano. Letero restinta ĝis nun sen respondo.

Teksto : Joris Bolomey ; Fotoj : Benoît Collet
Artikolo el la revuo La Vie de la 3a de aŭgusto 2023.

Mi tradukis tiun artikolon, pensante al Ukrainio. Kio restos en la grundo post tiuj nombraj bombardoj ?

Jeannine

Mallonga novelo

Se amo estas ŝarĝo

verkita de

Mome

Vi deziris min. Vi atendis min, ekzaltata de revoj. Vi laŭdis min. Poste vi forĵetis min.

Kiom ajn antaŭlonge mi memoras, mi radiis de via amo. Vi estis mia absoluta suno. Ĉio venis al mi el vi : la lumo, kie mi baniĝis, la varmo, kiu envolvis min. Mi estis via steleto.

Vi instruis min pri ĉio.

Vi estis elstara muzikistino. Muziko estus nia granda aventuro. Sur viaj genuoj mi komencis miajn unuajn gamojn. Mi ludis mian unuan infanludkanton antaŭ ol paŝi.

Sed vi ankaŭ estis fama astrofizikistino. Mi kreskis ĉirkaŭita per la verkoj de Kepler, Newton, Herschel. En iliaj verkoj mi lernis legi.

Por ekdormigi min vespere, vi rakontis al mi pri la ĉielo. Neniu Neĝblankulino nek Ĉarma Princo ; neniuj feinoj nek sorĉistinoj. Mi ploris pri la ruĝaj gigantoj mortantaj ĉe la rando de infinito. Mi jubilis pro rakonto pri stelkolizioj, el kiuj ŝprucas grandaj artfajraĵoj. Mi fervore atendis la preterpason de la kometo de Halley, kiu neniam revenos. La ekspansianta universo timigis min : ĝi estis mia Granda Malbona Lupo.

Mi faris ĉion por plaĉi al vi. Mi ankoraŭ ne estis kvarjara, kiam mi komprenis, ke vi malestimas mian patron – ho ! Subtila malestimo, preskaŭ eleganta, sed ne kontestebla. Tiam mi rigidiĝis en liaj trankviligaj brakoj, mi distanciĝis disde liaj grandaj ekĝoj kaj ekridoj. Mi forferis lin sen bedaŭro por via amo.

Ĉiudimanĉe, ni kuniĝis apud via avino kun viaj tri fratoj kaj ties multinfanaj familioj, tiuj naskitaroj da rozaj kaj kriaĉantaj porkidoj , kiel vi nomis ilin. Mi ripetadis la dancon de la Sukermigdala Feino de Tĉaĥkovski sur la granda piano de la salono, ĝis irito de la fingroekstremaĵoj.

Nur unufoje mi cedis al la mildeco de mia granda kuzino Adelaida. Ŝi estis sidiginta min sur balancilon kaj mi delice tremetis sub ŝiaj impetoj. Vi lasis min ludi la tutan posttagmezon. Ĉe la reveno, vi demandis :

— Hortensa, ĉu vi do volas simili al tiuj incitaj porkidoj ?

— Ho ! Ne, Panjo, al vi !

Nur al vi mi volis simili. Mi do distanciĝis disde Adelaida.

En la pluvdimanĉoj, la infanoj restadis en la granda salono, kolorigante belajn, lumajn albumojn, dum mi



instaliĝis ĉe la granda piano. Mi restis tie dum horoj, flugante sur la klavoj, ebria de via feliĉo.

Grand-Nanie Lou donacis al mi okaze de miaj kvin jaroj belegan skatolon da paŝteloj, kaj en tiu dimanĉo, post kiam mi blovestingis miajn kvin kandelojn sub la familiaj aplaŭdoj, mi rave kolorigis grandegan ĉielarkon. Ĉiujn kolorojn mi uzis, unu post la alia. Tio estis delica malkovro.

Antaŭ nia foriro, vi proponis, ke mi interpretu « La Turbo » de Bizet, kaj dum vi sidigis min sur la tabureton, vi memorigis al mi kun amuziĝa paŭzo :

— Ĉu vi memoras, Hortensa, ke Mozart komponis siajn unuajn verkojn en la aĝo de kvar jaroj ?

Tiuvespere mi forlasis mian skatolon de paŝteloj. La postan dimanĉon ni trovis mian brilan ĉielarkon enkadrigitan inter la desegnoj de la kuzoj. Vi malaprobis : « Tio estas de konsterna vulgareco ! ».

Tiam vi ekmetis viajn gvidmarkojn en mian vivon : «Vulgara. Senvalora . Ordinara ».

Kuri kriante kiel la kuzoj estis vulgare. Kolorigi albumojn estis senvalore. Cidiri al sia patrino estis ordinare.

Ordinare estis la plej timinda rifo. Ilustritaj libroj estis ordinaraĵoj. Frue enlitiĝi estis ordinare. Lerni en klaso kun aliaj infanoj estis ordinare.

Okaze de miaj sep jaroj, vi donacis al mi astronomian lornon kaj vi donis al mi la lunon, por ke mi familiariĝu kun ĝi. Mi ŝatis tiun dikan globon trankviligan kaj familieran. Kaj vi celdirektis la lornon pli foren. La luno, kiu estis akceptinta min, ne plu estis rifuĝejo, nur ridinda malgranda pilko, malvarma.

En astrofiziko, vi estis tiel eminenta ! Vi montris al mi la vojon, plaĉis al vi, ke mi restu malantaŭ vi. Male, en muziko, vi atendis ĉion el mi. Necesis, ke mi preterpasu vin. Vi estis talenta, mi estus virtuoza. Mi estis via stelo : mi estus via apoteozo !

En mia naŭa jaro, vi prezentis min al mia unua konkurso en muzikaltlernejo. Mi konkeris la publikon kaj la ekzamenantaron.

Tio estis mia unua premio. Vi radiis kaj via amo prilumis min. Aliaj premioj sekvis. Mi estis promesplena. Mia lumo alproksimiĝis al la via. Ĝis miaj dekkvin jaroj.

Tiujare mi estis la dua en la granda premio de la



muzikaltlernejo.

Mi suferis pro via elreviĝo sed mi ne rezignis. Mi estis montronta al vi, ke mi scias, kiom da penoj necesas por releviĝi el malsukceso. Sed laŭ vi jam tro malfruis. La postmorgaŭon vi refermis la pianon sur miajn fingrojn : kun firmeco sen perforto sed sen espero.

« Estas finite, eta nebulozo. »

Ekde tiu tago vi nomis min « Nebulozo ». Mi ĵus estingiĝis. Mi neniam resendus al vi la lumon.

Tiam mia falo rapidiĝis. Vi rekontaktis la observatorion de Alma en Ĉilujo, poste vi enskribis min al la liceo. Antaŭ la pordo de la estro vi diris al mi :

— Kaj ne plu vidiru al mi, tio povus ŝajni malmodesta.

Poste vi reiris al viaj studoj, tie supre, sur la altebenaĵo de la Andoj kaj vi forlasis min al mia patro.

Hodiaŭ mi festas miajn kvardek jarojn. Ankoraŭ unufoje, vi ne venis.

Ĉiuj gekuzoj estis tie, kun novaj naskitaroj da rozaj kaj emociaj porkidoj.

Ne mi.

Sola mi restis. Via amo, kiu estis edukinta min, poste glorinta min, premegis min. Mi surradiiĝas :



mi neniam amis alian ol vi.

Panjo, vi pravis, mi estis – mi estas – stelo. Mortinta !

Stelo, kies koro rompiĝis la tagon de miaj dekkvin jaroj.

Nigra truo. Pro via amo.

Du mallongaj rakontoj por mastreĉiĝi

Tri maljunuloj, kiuj estas bonaj amikoj, retroviĝas post multaj jaroj.

-kion vi faras ekde kiam vi estas emeritoj ?

La unua diras : « mi fotadas »

La dua : « mi ĝardenumas »

Kaj la tria anoncas : « mi esploras ! »

Do bone ! sed en kiu fako ?

- Ĉiutage, mi serĉas miajn okulvitrojn, mian marŝbastonon, mian dentaparon, miajn ŝlosilojn !

En hospitalo, maljunulo kuŝanta sur sia lito, ĝislace krias : revolvero, bazuko, fusilo, mitraleto.

La flegistino hastige eniras en la dormĉambron kaj skoldas lin.

-« Estas malbone krei tiamaniere ! Vi kredas vin ankoraŭ dum la milito ? Kaj kio estas tiu urinaodoro ? »

Ŝi levas la littukojn kaj ekvidas, ke ili estas tute malsekigitaj. -« Estas naŭza ! »

-Vi povintus peti la pistolon (urinujojn)

-« Jen, la pistolo ; estas la vorto, kiun mi serĉis »

Kukurbeta kuko proponita de Gérard kaj Jeannine

250 g da faruno

400 g da kukurbetoj

100 g da raspita grujero

4 ovoj

30cl da lakto

1 ajlero

1 saketo da gisto

Petroselo kaj mento

Salo kaj pipro

Tranĉu en maldikajn pecojn la kukurbetojn kaj rapide subrostigu ilin.

Miksu kun petroselo kaj mento.

Batmiku la ovojn en omleto. Aldonu la farunon, grujeron, bakpulvoron, kukurbetojn, ajleron, menton, petroselon, salon kaj pipron.

Baku en forno almenaŭ 45 mn.

